2-a Internacia Vintra Universitato
- agnoskita kiel AIS-sesio -

AIS-IVU: 2-a Internacia Vintra Universitato en IF

*La Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu festis en Jokohamo sian sesdekan datrevenon, **ĝ**is la jaro 1980 nomi**ĝ**is Internacia SOMERA Universitato (ISU). Kial ne estu ankaŭ VINTRA universitato? Oni **ŝ**an**ĝ**is la nomon ISU al IKU dum la UK en Brazilo, kiu okazis en la vintro de la suda hemisfero. En la UK en Tampereo, 1995, ni organizis la unuan komunan sesion de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj IKU. Pasintjare ni provis krei IVU - la vintran ekvivalenton de IKU, kiu samtempe estas studadsesio de AIS (fakte AIS-sesio okazis dum IF jam trifoje en la pasinteco).*

*La **ĉ**i-jara elekto de temoj estas denove varia. La prelegoj estas en la formo de tri AIS-kursoj, kiuj konsistas el po du prelegoj. Fine estas la ebleco ekzameni**ĝ**i kaj akiri AIS-atestojn.*

Amri Wandel (rektoro)

Prof. d-ro Amri Wandel (Israelo)

» Teleskopoj: niaj okuloj al la Kosmo «

La Jaro 2009 estas la 400-a datreveno de la invento, kiu ŝanĝis nian komprenon de la universo: la teleskopo. Tial ĝi ankaŭ estis proklamita de Unesko kiel la Internacia jaro de Astronomio. Galileo Galilei (1564 - 1642) utiligis sian inventaĵon por malkovri interesajn astronomiajn objektojn, kiel la makulojn sur la suno, la kvar lunojn de Jupitero kaj la fazojn de Venuso. La simplan du-lensan tubeton de Galileo *(vd. dekstran bildon)* nuntempe anstataŭas gigantaj speguloj en la spaco kaj ĉe la pintoj de altaj montoj. Per ili ni povas esplori galaksiojn preskaŭ ĉe la horizonto de nia universo, je distanco (tempa kaj spaca) de miliardoj da lumjaroj. La okulojn de Galileo anstataŭas nuntempe komplikaj aparatoj, kiel CCD kaj spektrometro, kaj la nunaj teleskopoj ne estas limigitaj al la videbla lumo, sed esploras la universon en pluraj specoj da radiado ne videblaj al la homa okulo, kiel radio-ondoj, infra-ruĝo kaj X-radioj. La prelego havos ankaŭ praktikan parton: ni lernos kiel efektive uzi astronomian teleskopon kaj kompreneble mem uzos ĝin por observi planedojn kaj aliajn interesajn ĉielajn astrojn *(vd. niajn informojn surloke)*.

Amri estas profesoro pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo. Specialisto pri aktivaj galaksioj, nigraj truoj kaj astrobiologio. Gast-profesoro en la universitato (UCLA) de Los Anĝeleso, Usono.

Prof. d-ro Renato Corsetti (Italujo)

» Lingvistikaj observoj pri kelkaj trajtoj de Esperanto «

Zamenhof estis filo de sia tempo kaj de siaj loĝlokoj. Estas maljuste akuzi lin, ĉar li ne estis kiel nuntempa usonano, eŭropano aŭ aziano. Esperanto prezentas ecojn tipajn de la eŭropaj lingvoj tiamaj. La tiel nomata seksismo de la lingvo estas unu ekzemplo, kiun oni devas provi forigi laŭgrade, kiel okazas en aliaj lingvoj de la mondo, ne per perfortaj kaj abruptaj rompoj. La prelego, tamen, ne parolos pri tiu problemo, sed pri la eŭrop-centreco de Esperanto, alia granda problemo, pri kiu dum la historio de Esperanto nur okupiĝis kelkaj japanoj. Se estas maljuste, kaj ja povas esti maljuste, per "li" aludi ankaŭ al ŝi, kion diri pri la daŭra naturismigado (=okcident-eŭropigado) de la vort-provizo? Tiuj, kiu diras "dura" anstataŭ "malmola" pretervole malamas la koreajn komencantojn. Abundaj ekzemploj estos donataj.

Renato, profesoro pri psikopedagogio de Lingvo kaj Komunikado en Romo, estis prezidanto de UEA (2001-2007).

Dipl. inĝ. d-ro Eugen Macko (Germanio)

» Evoluo de naciaj ideologioj ĉe mezeŭropaj popoloj «

En Eŭropo aperis historia tempo, kiam ĉiuj el tie vivantaj popoloj alprenis la preman devon, esprimi, formi kaj ordigi sian ĝistiaman kulturon per klasikaj normoj. La lingvoj ricevis la devon, surmetinte la gramatikan skeleton de la latina, kultivi novan, klasike idealan staturon. La ĝistiamaj, ĝenerale nur de generacioj al generacioj rakontitaj spertoj, per la novformitaj klasikaj lingvoj, komencis esti ankaŭ skribitaj. Ekestis kulturoj en la miksaĵo de la praa de iu popolo, kun la klasik-eŭropa grek-latina tradicio. En tiu nova kulturepoko, je la fino de la feŭdalismo kaj la komenco de la kapitalismo, montriĝis ankaŭ novaj problemoj. Antaŭe, la latina lingvo ligis diverskulturajn popolojn, tie kie komuna interkompreniĝo necesis. Sed nun ekestis la idealo de memstara suvereneco, el iu mistike profunda prahistorio, de kie la multaj popoloj volis sin mem aserti, per la propra lingvo, ne plu atentante ĉu la aliaj komprenas ilin aŭ ne. Tiu tendenco rapide disvastiĝis al unu-kontraŭ-alieco, per la idealo de la en si mem enŝlosita propra suverena nacia ŝtato, kontraŭ ĉiuj aliaj, t.e. al la resto de la mondo. En sia memaserto ĉiu volis esti tre "scienca" kaj provis konstrui propran asertsistemon por "fundigi la rajton de la propra ideala ekzisto" kiu baldaŭ deformiĝis en la volo, superi ĉiujn aliajn, el la fakte nur supraĵe konataj legendoj de la propra historio. Se la scienco ne povis reale fundigi la dezirojn, restis bonvena ankaŭ duonscienca ideologio. Eble ni povus diri, ke ĝuste en la mezeŭropa parto de la mondo kaŭzis tiuj ideologioj la plej multan malfeliĉon, malamon kaj suferon, unu kontraŭ la aliaj; kiujn sekvis militoj, perfortoj kaj forpeloj. En nia estanteco alvenis la tempo paroli pri ofte ankaŭ en psikaj kompleksoj forŝovitaj tabuaj problemoj, inter la diversaj popoloj, ilin prilumigi kaj lerni el historiaj spertoj. La prelego volas ekspliki la evoluon de naciaj ideologioj ĉe mezeŭropaj popoloj laŭ la ekzemplo de Ĉeĥoj, Slovakoj, Ukrainanoj, Rumanoj, Germanoj, Serboj, Kroatoj, Slovenoj kaj Hungaroj. "La internacie historia observadmetodo" estos aplikata de prof. Arato Endre, membro de la "Hungara Akademio de la Sciencoj", kiu multflanke kongruas kun la "dialogika metodo" de la "nova pensado" en la filozofio.

Eugen studis konstruteknikon en la universitato de Beogrado, poste filozofion, internacian politikon kaj socipsikologion en la universitato de Munkeno.